

Raporto pri prelegoj kaj renkontiĝoj

dum la Turneo de HORI Jasuo kaj ARAI Toshinobu

2012 / 09 / 12 - 10 / 02

Post kiam mi fariĝis estrarano de UEA en 2007, okazis la estrara kunsido en aprilo en 2008. Tiam francaj esperantistoj proponis, ke mi prelegu en Francio, profitante mian vojaĝon al Roterdamo, Nederlando. Mi volonte akceptis tiun proponon kaj vojaĝis en Francio kun s-ro Arai Toŝinobu el la urbo Okajama. Miaj prelegoj tre plaĉis al francaj esperantistoj, tial same venis propono en 2009 kaj en 2010. En 2011 mi jam ne estas estrarano, do por iri al Francio mi mem devas pagi por la flugbiletoj. Komence mi decidis ne iri plu al Francio, sed venis mesaĝo el kelkaj homoj, ke francaj esperantistoj ege atendas min, kaj eĉ interkverelas por venigi min. Aŭdante tiujn voĉojn, mi nuligis la antaŭan decidon kaj sendis mian mesaĝon, ke mi iros en septembro. Tiamaniere en 2011 la vojaĝo al Francio okazis.

En la antaŭaj jaroj miaj prelegtemoj estis koncerto per diversaj nekutimaj muzikiloj, kaligrafio, rilatoj inter Francio kaj Japanio, Hietori-terapio, kantoj, japanaj gestoj ktp. Tamen en 2011 okazis la granda katastrofo en Japanio, tial mi decidis prelegi ĉefe pri tiu temo, kaj por tio mi preparis fotojn (fotojn pri la cunamo kaj rifuĝintoj el gazetoj kaj fotojn de la gubernio Mijagi kaj de la gubernio Iŭate, kiujn mi mem fotis). Ankaŭ s-ro Arai kunportis materialojn pri la katastrofo, kaj por mia prelego li helpis min per sia komputilo por prezenti la fotojn en la ekrano.

Tiun ĉi jaron, en 2012, ĉar la damaĝitaj gubernioj tute ne leviĝis el la damaĝoj de la katastrofo, mi denove prelegis ĉefe pri la postaj tagoj de la katastrofo. Dum la pasintaj jaroj mi multe vojaĝis al la damaĝitaj gubernioj, do mi povis aldoni la fotojn el tiuj vojaĝoj al la lastjara fotaro. Tio plibonigis miajn prelegojn.

Miaj prelegoj pri la katastrofo kaj aliaj prezentaĵoj estis tre sukcesaj en ĉiuj 8 urboj, kolektinte entute 500 homojn. Tiu nombro estis la plej granda en la pasintaj jaroj kaj atestas, ke francoj havas grandan intereson pri la nuklea akcidento en Fukuŝima. En kelkaj urboj mia prelego estis organizita de la Esperanto-klubo kaj Klubo kontraŭ atomenergio. Tial miaj prelegoj multe kontribuis al ambaŭ movadoj.

Samtempe mi petis, ke ili subtenu orfojn en la cunamo, kaj mi povis kolekti 170000 enojn, kiujn mi sendis al lernantoj en la vilaĝo Tooni en la urbo Kamaiŝi.

Mia vizito estis tre fruktoplena. Mi dankas al ĉiuj, kiuj helpis nin dum la vojaĝo. Multaj homoj volas nian revenon al Francio, do ankaŭ en la venonta jaro ni volas viziti ilin.

Jen resume:

1. Prelegoj pri la katastrofo, ĉefe pri Fukuŝima

9/14 St. Briec (110 homoj), 9/16 St. Nazaire (10), 9/19 Angers (73), 9/21 La Roche sur Yon (20), 9/24 Kvinpetalo (10), 9/27 Brive (45), 9/29 Toulouse (36), 9/30 Tarbes (86)

2. Koncerto per muzikiloj kaj/aŭ kaligrafio, origamio

9/14 St. Briec (20 homoj), 9/16 St. Nazaire (30), 9/21 La Roche sur Yon (90 en elementa lernejo), 9/22 St. Michel (8), 9/24 Kvinpetalo (32 en elementa lernejo), 10/1 Toulouse (23 en elementa lernejo)

Entute 593 homoj partoprenis en mia prelegoj.

Krome en 2 ĵurnaloj kaj unu radio-elsendo mi aperis.

Niaj agadoj

St. Brieuc 2012 / 09 / 12 -14 (tranoktoj ĉe s-ro Guy Martin)

La 12a de septembro

1. Alveno al Francio frumatene
2. Intervjuo kun du ĵurnalistoj (en 13a aperis relative granda artikolo en unu el la ĵurnaloj, kaj malgranda en la alia ĵurnalo.)

La 13a de septembro

1. Radio-elsendo ĉe katolika Radio (20 minutoj?)
2. Koncerto per muzikiloj al junaj laboristoj

La 14a de septembro

1. Prelego pri Fukuŝima en universitato de Renne

St. Nazaire 2012 / 09 / 15–18 (tranoktoj ĉe s-ino Chantal Barret)

La 15a de septembro

1. Alveno al St. Nazaire

La 16a de septembro

1. Panbakado en la vilaĝo Savenay
2. Prelegeto pri Fukuŝima dum la panbakado
3. Koncerto per muzikiloj kaj kaligrafio en la najbara vilaĝa salono

La 17a de septembro

1. Posttagmeze vizito al la salproduktejo kaj eksa germana militbazo por submaraj ŝipoj

Angers 2012 / 09 / 18–20 (tranoktoj ĉe s-ro Laurent Vignaud)

La 18a de septembro

1. Alveno al Angers
2. Babilado kun kelkaj esperantistoj kaj poste vespermanĝo

La 19a de septembro

1. Vizito al la kastelo Brisaac kun 5 esperantistoj
2. Prelego pri Fukuŝima

La Roche sur Yon 2012 / 09 / 20 -21(tranokto ĉe s-ro Patrice Joly)

La 20a de septembro

1. Alveno al La Roche
2. Vespere ĉeesto ĉe koncerto en la preĝejo

La 21a de septembro

1. Promenado en la urbo
2. Koncerto per muzikiloj en lernejo
3. Prelego pri Fukuŝima
4. Nokte veturo al s-ro Stefano Roberto en St. Michel

St. Michel 2012 / 09 / 21–23 (tranoktoj ĉe s-ro Stefano Roberto)

La 22a de septembro

1. Vizito al La Rochelle kun 6 esperantistoj
2. Kunvespermanĝo kun 20 esperantistoj kaj aliaj en St. Michel

Bouresse (Kvinpetalo) 2012 / 09 / 23-26 (Tranoktoj ĉe Kvinpetalo)

La 23a de septembro

1. Vespere atingo al Kvinpetalo

La 24a de septembro

1. Koncerto per muzikiloj en la lernejo
2. Vespere prelego pri Fukuŝima

La 25a de septembro

1. Koncerto per muzikiloj kaj origamio en la sama lernejo

Souillac 2012 / 09 / 26-28 (tranoktoj ĉe s-ro Paul Signoret)

La 26a de septembro

1. Isabelle Jacob venis kaj kune iris al Souillac ĉe s-ro Paul Signoret

La 27a de septembro

1. Vizito al la urbo Dommes
2. Vespere en Brive prelego pri Fukuŝima

Toulouse 2012 / 09 / 28 – 10 / 2 (tranoktoj ĉe s-ro Rikardo Cash)

La 28a de septembro

1. Alveno al Toulouse

La 29a de septembro

1. Promenado laŭ la kanalo
2. Posttagmeze prelego pri Fukuŝima

La 30a de septembro

1. Veturo al Tarbes kaj prelego pri Fukuŝima

La 1a de oktobro

1. Koncerto per muzikiloj en la okcitana lernejo
2. Posttagmeze promenado en Toulouse

Al Japanio

La 2a de oktobro

1. Matene flugo de Toulouse al Parizo, kaj plua flugo al Japanio

La 3a de oktobro

1. Frumatene atingo al Japanio

Resume:

1. Dank' al la bona organizado de s-ro Ives Nicolas kaj bonaj kontaktoj inter prizorgantoj nia vojaĝo estis perfekte bonorda. Mi dankas al ĉiuj, kiuj akceptis nin kaj bonvenigis nin.

2. Prelegoj kaj kunvenoj estis bone organizitaj.

500 homoj ĉeestis en miaj prelegoj kaj koncertoj. Dum la 20 tagoj ni renkontiĝis kun multaj geesperantistoj kun amika sento.

3. Lastan jaroj okazis katastrofo kaj nuklea akcidento en Japanio, pro kio francoj havas multan intereson pri la situacio, kaj kun granda intereso ili aŭskultis niajn prelegojn. Ni bone preparis nin por la prelegoj, do ĉeestantoj bone komprenis la situacion en Japanio. En miaj prelegoj partoprenis multaj ne-esperantistoj, kiuj certe agnoskis, ke Esperanto estas vere vivanta lingvo kaj tre utila por diversaj aferoj.

4. Estas grave, ke en 3 urboj oni organizis la viziton al lernejoj. Miaj koncertoj per muzikiloj ĝojigis ilin, kaj certe ili memoris la vorton Esperanto.

5. Amaskomunikiloj havis intereson pri niaj vizitoj: Antaŭ niaj vizitoj jam aperis anoncoj en diversaj lokoj. Kaj en St. Brieuc du ĵurnaloj aperigis artikolon kaj la katolika radio elsendis mian intervjuon ĵus antaŭ la prelego.

6. Mi nun kunlaboras en la projekto por helpi geknabojn en la damaĝitaj lokoj, do petis de la ĉeestantoj mondonacon al tiuj. Multaj sincere reagis al mia peto, kaj la sumo de la donacita mono atingis 1725 eŭrojn (el kiuj 1000 eŭroj venis de unu anonima esperantisto). Mi jam transdonis la monon al la respondeculoj de tiu projekto.

7. Miaj turneoj estis tre signifoplenaj ne nur por Esperanto sed ankaŭ por interkompreniĝo inter francoj kaj japanoj. Mi povis doni al francoj multajn informojn pri Japanio, kaj reveninte hejmen mi verkis/os raportojn pri miaj vojaĝoj por japanoj, kaj Arai montris/os fotojn al la publiko.

8. Multaj francoj espreimis sian volon inviti nin denove. Tio tre ĝojigas nin. Se eblas, ni nepre vizitos vian landon ankaŭ en la venonta jaro.

Reveninte hejmen, mi estas tre kontenta pro mia laboro kaj dankema al ĉiuj rilatantaj homoj. Salutante varme al vi, mi finas mian raporton.

HORI Jasuo

2-13-3 Ootone, Maebaŝi, Gunma, 371-0825 Japanio

hori-zonto@water.sannet.ne.jp